

Brazila *Esperantisto*

OFICIALA ORGANO DE
BRAZILA LIGO ESPERANTISTA

Societo de publika utileco, laŭ registara dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921

Respondeca redaktoro (redactor principal) s-ro Carlos Domingues

REDAKCIO — Praça 15 de Novembro, 101

RIO DE JANEIRO — BRAZILIO



Grupo de la partoprenintoj en la esperantista tagmango ĉe "Grande Hotel Riachuelo"

BRAZILA LIGO ESPERANTISTA

(Liga Esperantista Brasileira)

B. L. E.

(Reconhecida de Utilidade Publica pelo Decreto
n. 4356, de 26 de Outubro de 1921)

Unuiĝo Kreas Forton

ESTRARO de B. L. E.

Honora prez. — D-ro Everardo Backheuser
Hon. vic-prez. — D-ro Venancio da Silva
Prezidanto — Ing. A. Couto Fernandes
Vicprezidanto — D-ro Carlos Domingues
Generala sek. — Ing. L. Porto Carreiro Neto
1^a sek. — S-ro Odillo Pinto
2^a sek. — F-ino Yrany Baggi de Araujo
Kasisto — S-ro E. Felix Tribouillet

GRUPOJ ALIĜINTAJ AL "B. L. E"

1. BRAZILA KLUBO "ESPERANTO". (1906) Sidejo: *Praça 15 de Novembro, 101, Rio de Janeiro.*
2. VIRINA KLUBO. (1912) Sidejo: *Praça 15 de Novembro 101, Rio de Janeiro.*
3. GRUPO ESPERANTISTA "COUTO FERNANDES". (1914). Sidejo: *Rua Collares Moreira, 116. S. Luiz do Maranhão.*
4. NOVA SAMIDEANARO. (1919). *Tristão Gonçalves, 55. Fortaleza. Ceará.*
5. ESPERANTISTA RONDETO "VERDA STELO". (1919). *São Bonifacio. Correio de Therezopolis, Sta. Catharina.*
6. VERDA STELARO. (1920). *Rua Marquez de Cavias, 538. Pelotas. Rio Grande do Sul.*
7. SUD-BRAZILA ESPERANTISTIGILO". (1927). Sidejo: *Rua dos Andradas, 1431. Porto Alegre. Rio Grande do Sul.*
8. MONTARA ESPERANTO-KLUBO. (1927). *Grão Mogol, 197. Bello Horizonte. Minas Geraes.*
9. SERVIÇO DE ESTATISTICA GERAL DO ESTADO DE MINAS GERAES. (1929). *Secretaria da Agricultura. B. Horizonte. Minas Geraes.*
10. SAN-PAŬLA GRUPO ESPERANTISTA. (1930). Sidejo: *Rua Quirino de Andrade, 21 — 1.º São Paulo. Stato S. Paulo. Poŝtkesto 2536.*

ESPERANTA GAZETARO

I. S. K. — Organo de Internacio de Socialista Kunbatalo. Eldonata de l'estraro. Administrejo: — *Servette 79, Genevo. Svislando.* Abonprezo por Brazilo: 3\$000.

KULTURO. — Monata eldono. Adreso: D. Malcev. *str. Kapitan Rajčo N. 98. Plovdiv, Bulgarujo.* 3 jarabonoj kune 1,5 sv. franko.

MONDA KURIERO. — Ilustrita semajna organo por komerco, trafiko, industrio kaj ĉiuj aliaj branĉoj de monda ekonomio. Administracio: *Poŝtfako 131, Sarajevo. Jugoslavujo.* Jarabono: 5 Sv. frankoj.

MULTLINGVA INTERSTENO, monata stenogazeto en multaj lingvoj, kaj *Tutmonda Intersteno.* Internacinalstenografio, monata gazeto kaj oficiala organo de la Tutmonda Intersteno-Asocio. Rimarkinda estas ke tiu ĉi Asocio uzas Esperanton por propagandi Interstenson en la tuta mondo. Redaktoro: Fr. Graser, *Enkheim bei Frankfurt a. M.* Eldonejo: Instituto de Internacinalstenografio. *Duisburg. Friedenstr. 79. (Germanujo).* Jarabono al la du: 3 RM.

KALEJDOSKOPO DE L'VIVO. — Dumonata organo internacia de B. E. S. Administracio: *Poŝtejn, Ĉeĥoslovakujo.* Jarabono (kun B. E. S. — Adresaro): 1.50 sv. franko.

KORESPONDADO

LUIS ASENSIO GIMENO, 18 jara, *Veronica 23 — 3º, Zaragoza, Hispanujo,* deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn, poŝtkartojn kaj gazetojn ilustritajn kun geesperantistoj de ĉiuj amerikaj landoj.

S-ro P. ANDRUSEVIČIUS, *Kaunas, Aŭstros 9. 22. Lithuania,* deziras korespondadi kun brazilaj gesamideanoj per leteroj, il. poŝtkartoj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

Gefratoj nederlandaj deziras korespondadi kun katolikaj brazilaj geesperantistoj. Ĉiam respondon. L. Weyts, *Auvergnestraat 20, Berger op Zoom, Nederlando.*

S-ro ALBERTO DOÛSIL, *Famailá, (Tucuman) Argentina,* deziras korespondadi kun brazilaj samideanoj.

S-ro P. GANKOVIĆ, 22 jara studento — *Pokrovka 31, ĉambro 45. Moskvo. Sovetio,* deziras korespondadi.

S-ro ALFRED MELBYE, *Toftes gt. 25. Oslo. Norvegujo,* deziras interŝanĝi esperantajn, poŝtmarkojn, monerojn, malnovajn bankbiletojn k. t. p.

BRAZILA ESPERANTISTO



OFICIALA ORGANO

de "BRAZILA LIGO ESPERANTISTA"

21 - a Jaro

Numero 1 - 6

Aliĝo al B. L. E.
Eksterlande

5\$000
Sv. fr. 4

Januaro-Junio 1930

REGAKCIO — Praça 15 Novembro, 101
RIO DE JANEIRO — BRAZIL

O INTERCAMBIO ESCOLAR E O ESPERANTO

Na historia do Esperanto no Brasil, este anno ficará assinalado por um facto de grande importancia: a adopção da lingua internacional auxiliar, por parte da Directoria da Instrução Municipal, no Serviço de Intercambio Escolar Interestadual e Internacional, recém-criado, e no qual o idioma neutro servirá de interprete para as communicações com os países de linguas menos accessíveis aos brasileiros.

Temos por vezes, nestas columnas, accentuado que, para a propagação do Esperanto, ha na America uma difficuldade desconhecida na Europa, e vem a ser o relativamente pequeno numero de linguas nacionaes faladas nesta parte do mundo. Do Mexico para o sul não ha, a bem dizer, abismos linguisticos semelhantes aos que separam os Europeus, mesmo quando se trate de povos vizinhos.

Hispano-americanos e brasileiros conseguem entender-se, usando cada qual a propria lingua. Entre nós o turismo é incipiente. Os estrangeiros que aqui aportam trazem, em consideravel maioria, a intenção de fixarem-se para sempre e, pois, aprendem o nosso idioma. São outros tantos factores que aos olhos da grande massa podem talvez attenuar a idéa da necessidade de uma lingua internacional. E, de facto, devemos admittir que para muito ainda não surgiu o dia em que precisassem exprimir-se em lingua differente da materna: assim se explica, aliás, como tantos que despenderam annos a estudar o francês e o inglês são incapazes de articular uma phrase nessas linguas, visto que dellas nunca se utilizaram, exactamente porque o meio onde vivem nunca lhes deu tal oportunidade.

Provavelmente, porém, por uma compensação natural, se a uma intelligencia menos penetrante o ambiente impede de appreender de prompto o immenso serviço que o Esperanto está chamado a prestar ao mundo culto, as mentalidades de escol descortinaram para logo, desde o inicio da propaganda esperantista em nosso país, o incalculavel valor que uma lingua auxiliar representa para a civilização.

Temos, graças a esses elementos de cultura, podido acompanhar o rhythmo mundial do desenvolvimento do Esperanto.

O acto da Directoria de Instrução é consequencia da orientação elevada que estão imprimindo a esse departamento os srs. drs. Fernando de Azevedo, director, e Jonathas Serrano, sub-director tecnico.

O Esperanto no serviço de intercambio está no justo lugar, acorde com a sua finalidade, e mostrará sem demora as vantagens que do seu emprego podem advir.

A Liga Esperantista Brasileira, que se collocou á disposição dos illustres dirigentes da instrução municipal para o sympathico movimento de intercambio iniciado, está dando ao mesmo a sua modesta, mas dedicada cooperação, quer por meio dos cursos para professores que, em numero de quatro, já estão funcionando, quer por intermedio do delegado que, a convite da Directoria da Instrução, a Liga representa na Commissão de Intercambio, participando das reuniões.

C. D.

UNUA PAROLANTA FILMO EN ESPERANTO

Dum la tagoj 30a Junio kaj 1a Julio, kiel ĝentilaĵo de la administranto de "Paramount" ĉe Brazilo, S-ro Tibor Rombauer, al B. L. E., estos prezentata en "Cinema Capitolio", Rio de Janeiro, la unua parolanta filmo en Esperanto.

Ĝi konsistas el triminuta dialogo inter S-ro Henry W. Hetzel, prezidanto de Nord-Amerika Esperanto-Asocio, kaj S-ino Charles Chomette, el Belgujo, kaj saluton al la tutmonda Esperantistaro.

Estas grave, por ke la "Paramount" kaj aliaj filmkompanioj faru similajn parolantajn filmojn en la estonteco, ke samideanoj ĉie nepre vidu la filmon kaj esprimu sian aprobon kaj intereson al la produktintoj (Paramount — Famous — Lasky Corporation, Times Square, New York) — kompreneble en Esperanto.

22.^a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

OXFORD. 2.^a — 9.^a AŬGUSTO 1930

Kongresejo: — La Urbdomo de Oxford.

Protektantoj: — Lia Princa Moŝto la Duko de Connaught; Kapitano Button, M. C. Urbestro de Oxford; S-ino M. I. Corbett Ashby, prezidanto de la Internacia Unuiĝo de Virinoj; lia konsilanta moŝto J. R. Clynes, M. P., Ŝtat-ministro por Enlandaj Aferoj; lia konsilanta moŝto Arthur Henderson, M. P., Ŝtat-ministro por Eksterlandaj Aferoj; lia konsilanta moŝto Sir Charles Trevelyan, Bt, M. P., Ŝtat-ministro por Edukado kaj diversaj estroj de kolegioj.

Help - Kongresanoj. — Tiuj, kiuj ne povos ĉesti la Kongreson, povas tamen aliĝi kiel help-kongresanoj po dek ŝilingoj. Ili ricevos la kongres - insignon kaj dokumentojn post la Kongreso.

Donacoj — La L. K. K. volonte ricevos donacojn por helpi al la plena sukceso de la Kongreso.

Honora Prezidanto. — La Honora Prezidanto de la Kongreso estas S-ro John Merchant, Prezidanto de I. C. K. kaj B. E. A.

Somera Universitato: — Ĝenerala temo: "Lingvo kaj Vivo". Preskaŭ certe prelegos Prof. Th. Cart (*Parizo*), Prof. W. E. Collinson M. A., Ph. D. (*Liverpool*), D-ro K. de Kaloesay (*Budapest*), Prof. B. Migliori (*Romo*), kaj S-ro P. Bennemann (*Leipzig*).

Ĝis 30-a de Aprilo aliĝis al la Kongreso 505 personoj.

RIO DE JANEIRO — PARIZO

La trian de Aprilo, dank'al ĝentileco de "Companhia Radiotelegraphica Brasileira", S-ro A. Couto Fernandes, prezidanto de Brazila Ligo Esperantista, en Rio de Janeiro, interparoladis kun S-ro Emile Houbart, direktoro de la franca gazeto "La Movado", en Parizo, pere de senfadena telefono.

S-ro Couto Fernandes salutis la francan esperantistaron en la nomo de la brazilaj esperantistoj. S-ro E. Houbart dankis kaj reciprokis la saluton. Finiĝis la interparolado per la du vortoj "Vivu Esperanto" dufoje diritaj.

Tiu estis la unua fojo, kiam du personoj

rekte interparoladis per senfadena telefono uzante la internacian lingvon.

La plej gravaj ĵurnaloj el Rio de Janeiro kaj S. Paulo publikigis telegramon el Parizo kaj notojn pri tiu okazintaĵo.

Ĉi-sube ni publikigas la du salutojn:

"Bonan tagon, Sinjoro Emile Houbart.

El Rio de Janeiro, ĉefurbo de Brazilo, tra dekmilo da kilometroj, parolas nun al vi Alberto Couto Fernandes, prezidanto de Brazila Ligo Esperantista kaj subdirektoro de la Nacia Telegrafo.

Dank'al ĝentileco de "Companhia Radiotelegraphica Brasileira" mi havas la grandan plezuron paroli al vi pere de la senfadena telefono.

Akceptu, kara samideano, miajn plej korajn salutojn kaj bonvolu transdoni al la francaj gesamideanoj, pere de via tre interesa kaj simpatia gazeto "La Movado", la korajn salutojn de la brazila esperantistaro.

Mi kredas ke hodiaŭ estas la unua fojo, kiam du personoj interparolis per la senfadena telefono uzante la belan kreitaĵon de Zamenhof. Tial tio estas por ni motivo de granda ĝojo. Bonvolu diri al la francaj gesamideanoj, al kiuj Esperanto multe ĝaldas, ke ni, braziloj, neniam senkuraĝiĝos kaj vigle laboros ĝis la fina venko de nia kara afero".

"Tre estimata Prezidanto

Mi tre dankas vin pro viaj tiel afablaj paroloj.

Bonvolu transdoni al la brazilaj gesamideanoj la tutkorajn salutojn de la francaj gesamideanoj, okaze de la inaŭguro de la telefonlinio Paris — Rio de Janeiro. Grava fakto estas la nuna. Se ne plu ekzistas landlimoj por la parolo, dank' al tiu nova progreso, ne plu ekzistas ankaŭ inter nacioj lingvaj baroj, dank'al tiu alia progreso — Esperanto".

El letero sendita de S-ro Houbart al S-ro Couto Fernandes ni elĉerpis la jenon: "Mi ĵus sciigis tiun memorindan fakton dum kunveno de la Pariza grupo ĉe la Sorbonne, kaj la ĉeestantoj estis tre kortuŝitaj pro via afabla ago; ili petis min, ke mi denove esprimu al vi iliajn dankojn kaj korajn salutojn".

Dum la lasta tagmanĝo de la geesperantistoj el Rio de Janeiro S-ro Couto Fernandes sciigis siajn kunmanĝantojn pri tiuj okazintaĵoj kaj ili per varmaj aplaŭdoj elmontris siajn kontentecon kaj dankojn pro la ĝentilaj salutoj de la francaj gesamideanoj.

La Pariz'aj ĵurnaloj "Journal" kaj "Amitié Française" publikigis notojn pri tiu interparolado. Jen kio publikigis la lasta:

"Pour les espérantistes. Allo Paris... Ici Rio de Janeiro.

Le 1er avril a eu lieu entre le ministre des Postes français et son collègue brésilien la première conversation téléphonique Paris — Rio de Janeiro, le premier parlant en français et le second répondant en... brésilien. L'ambassadeur du Brésil à Paris traduisait les aimables messages oraux.

Le 3 avait lieu la première conversation entre le président de la Ligue Espérantiste du Brésil, M. Couto Fernandes, à Rio de Janeiro, et le directeur du journal espérantiste français *La Movado*, M. Emile Houbart, à Paris, le premier exprimant en Esperanto, un cordial salut aux espérantistes français et le second le remerciant en la même langue, avec une parfaite compréhension de part et d'autre. Deux gestes symboliques!"

SKOLTISMO KAJ ESPERANTO

Jornal do Brasil, en sia "skolta fako", kies redaktanto estas nia samideano S-ro David de Barros, sciigas sian legantaron pri la progresoj de Esperanto ĉe la skoltoj kaj pri la baldaŭa fondo de Esperantista Klubo.

Ĝi publikigis la oficialan leteron, kiun D-ro Carlos Domingues, kiel ĝia reprezentinto ĉe la 21a Universala Kongreso de Esperanto, sendis al la Federacio de Brazilaj Skoltoj.

— Tiu ĉi Federacio jam aprobis la novan regularon de sia "Lernejo por Instruistoj de Skoltismo", el kiu ni transskribas ĉi-sube la jenajn artikolojn:


"Art. 31 — La Lernejo por Instruistoj de Skoltismo klopodos por ke la lernantoj, sentante la neceson scii la kelplingvon "Esperanto", ĝin lernu kaj ankaŭ faru ĉe la skoltoj propagandon de la Esperanto—movado pro la kunrilateco, kiu ĝi havas kun tiu Movado, ĝin efike helpante.

Art. 32 — Por tiu celo, la Lernejo subtenos liberan kurson de la internacia helplingvo kaj klopodos por la fondo de "Esperantista Klubo de Brazilaj Skoltoj".

La Prezidanto de la Federacio kaj direktoro de ĝia Lernejo estas S-ro Guilherme Azambuja Neves, ano de B. L. E.

Baldaŭ remalfirmiĝos la kurso de Esperanto sub la gvidado de S-ro A. Couto Fernandes.

PROFESORO TH. CART



La 31-an de Marto Profesoro *Théophile Cart*, prezidanto de la Lingva Komitato kaj de la Esperantista Akademio, plenigis sian 75-an vivojaron. Li naskiĝis en la jaro 1855 en Saint-Antoine (Dordogne) en sudokcidento de Francujo. La propagando de Esperanto, kiun li lernis en la jaro 1901, multon ŝuldas al Prof. Cart. Li verkis la tre konatan lernolibron "L'Espéranto en dix leçons", kiu estas tradukita en diversajn lingvojn, inkluzive la portugalan, kaj dum pli ol 15 jaroj li estis ĉefredaktoro de la bonega gazeto "Lingvo Internacia". Li fariĝis ano de la Lingva Komitato kaj de la Esperantista Akademio de ilia fondo kaj ilin prezidis de la jaro 1920.

En 1904 li fondis la Presan Esperantistan Societon. Li estis pioniro de la esperanta movado ĉe la blinduloj kaj fondinto de la gazeto "Esperanta Ligilo". Kiam aperis Ido, li fariĝis la centro de la esperantista rezisto bazita sur la fideleco al la Zamenhof'a Fundamento. Tiam famiĝis lia frazo: "Ni fosu nian sulkon".

Okaze de la 75-a datreveno de lia naskiĝo la membroj de L. K. kaj la estraro de I. C. K., en la nomo de la esperantistaro, sendis

al li gratulajn leterojn, kiujn li danke respondis per "Esperantaj Pripensoj".

S-roj Prof. E. Backheuser kaj A. Couto Fernandes, lingvokomitatoj, sendis ankaŭ gratulan telegramon.

S O N E T O

(C A M Ō E S (1))

Ho, vi ĝentila amatino kara,
Vokita frue el la vivo tera,
Ripozu pace en ĉiel' mistera
Dum mi vivados en sufer' amara.

Se en loĝejo via anĝelara
Memor' prihoma estas ja libera,
Vi do memoru pri la amo vera
En mi brulanta pura kaj senbara.

Kaj se vi juĝas indaj je premio
La miajn sorton kaj ĉagrendoloron,
Kompate petu vi por mi al Dio,

Ke min li same donu la favoron
Forsendi ankaŭ min al la legio
En kiu vi nun ĝuas sanktan gloron.

Trad. Martins d'Almeida

(1) Legu: *Kamoens*.

Luis de Camões estas la verkinto de "Luziadas", ĉefverko el la portugala poezio. Tiu soneto estas unu el la plej famaj, kiujn li verkis, kaj estas dediĉita al lia ĵus mortinta amatino. Ĝin eldonis en aparta folio, ilustrita per la portreto de ŝi verkinto, "Madeira Verda Stelo" — *Strato Dr. Vieira*, 100. *Funchal. Madeira*

Ĉ A S R A K O N T O

La enlandido troigas, rakontante siajn heroaĵojn ĉe la ĉasado aŭ rajdado. Multaj estas mensogemaj. Ili amas rakonti malveraĵojn kaj havas mirindan lertecon por elturniĝi el la embarasoj, kiam oni malkaŝas la malverecon de iliaj rakontoj. Pri tio oni rakontas ĉe la popolo anekdoton, kiu fidele montras la manieron, kiel la enlandido mensogas

kaj forsaviĝas de siaj propraj kontraŭdiroj kaj malfortaj punktoj.

Estis vintro. La blondaj maizokampoj orlumis en la suno. La enlandido dormetis en la reto, en la ombro de la teraso. Lia hundo dormis ĉe la pordo. En angulo, lia edzino, sidante ĉe kuseno, silente faris puntan per ŝpiniloj. Kaj de hoko, tenita per la traŝultra rimeno, pendis longa ĉasfajrarmilo. Alvenis baptano de la enlandido, eksidis sur tabureton kaj komencis konversacion. Poste, li demandis, ĉu la farjarmilo atingas malproksimen, ĉu ĝi havas bonan trafpovon. La domomastro, laŭdante ĝin, tuj disvolvis ĉas-historion:

— Ho, ĝi estas fama! Antaŭ kelkaj tagoj, tie, sur tiu supro — kaj li montris senherban monteton malproksiman kvincent metrojn — iris cervo. Mi celis ĝin per mia armilo, ekpafis, kaj la besto frotis la teron per la nazo!

La vizitanto malfermis larĝe la okulojn pro miro, kaj nekredeme demandis:

— Kaj, kie trafis la kuglo?

— Mi ne uzis kuglon, amiko! La ŝargaĵo estis plumbo. Unu plumbero trafis ĉe la orelo kaj penetris en la enkraniaĵon; la dua vundis la piedon.

— Kion, mia baptano? Rakontu senmensoge. Vi mokas min. Kiel estas eble, ke nur du plumberoj trafis la beston, unu ĉe la orelo kaj alia ĉe la piedo, de tiel malproksime?

La mensogulo konfuziĝis, balbutis, tussis... Tiam, lia edzino, stariĝante ĉe la kuseno kaj flegme deskuante de sia jupo la kudrofadenetojn, venis helpe de sia edzo:

— Ho, Emanuelo, ĉu vi do ne memoras, stulta, ke, kiam vi pafis la beston, ĝi gratis al si la orelon per la piedo? Sankta Dio, kia homo kiu tiel facile forgesas, kiel okazis la aferoj!

Tradukita el la bonega verko de Gustavo Barroso, ano de la Brazila Literatura Akademio — "Terra de Sol" (Lando Suna), kiu montras kuriozajn aspektojn de stato Ceará, ĉiam suferanta la teruran malfeliĝegon de kruela sekvetero. La "enlandido" estas frukto de la profunda brazila enlando mem; li estas vera "ido" de sia medio.

PORTO CARREIRO NETO

LA BONAJ TEMPOJ DE OLINDA . . . (1)

Inter siaj kolegoj, Emanuelo Jordano estis la plej gaja kaj eterna kandidato al la ekzameno de la latina lingvo. Sed la netrapenetrebla mortinta idiomo vive rezistadis al la atakoj de la obstina maldiligentulo. Jam dek-unu fojojn li estis antaŭ la drako, sed bedaŭrinde devis forkuri.

Li loĝis en Recife. Lupreninte ĉevalon, jen li ekiris sur la istmo por kroni sian kapon per la tiel dezirataj sed tiom da fojoj rifuzitaj laŭroj.

Survoje, la besto ekhaltis timigite, kurbdorse saltis, levis la antaŭajn manojn kaj jetis sian indan similulon sur la marbordan sablon. Feliĉe por la rajdanto, la ĉevalo ne fariĝis kiel li antaŭ la drako, tio estas, ne forkuris, kaj li povis resurseliĝi kaj pluen iri.

La ekzamenoj estis tiutempe prezidataj de la episkopo mem. La klasika libro por tradukado en la ekzamenoj estis resumeto de la Sankta Historio; al nia studento estas donita peco kun priskribado de rivero Jordano, en Palestino.

Tute senĝene la kuraĝulo legis la ricevitajn pecojn, memkompreneble per teruraj eraroj agacante ĝis frenezigo la orelojn de la ekzamenantoj. Poste, li komencis la tradukadon:

— “*Ubi*”, tuj kiam — “*mare*”, la animalo...

Li interrompis sin, kaj poze “klarigis”:

— La animalo, kiun mi rajdis, Episkopa Moŝto!

Kaj daŭrigis:

— “*Vidit*”, vidis...

Refoje haltante, li komentariis:

— Tamen, mi ne scias, kion ĝi vidis!

“...*stetit*”, haltis. “*Jordanus*”, kaj mi, Emanuelo Jordano, — “*retrosus est*”, posten falis.

La episkopo, surprizite antaŭ tiu speciala talento, ekdiris:

Mi miras!

— Kaj mi miregas, — respondis la senhontulo — mi pli miras, vidante, ke okazaĵo, ĵus fariĝinta al mi sur la istmo, jam estas presita en tiu ĉi libro!

La kronikoj ne diras pri la sukceso de tiu ekzameno; sed estas verŝajne, ke la ekzame-

nito ricevis la dekduan de la “bomboj”, per kiuj li festadis kun siaj kolegoj sian mirindan talenton por tradukado.

El la kronikoj adaptis al Esperanto

Porto Carreiro Neto

ESPERANTISTA TAGMANĜO

Je la 4a de Majo okazis ĉe “Grande Hotel Riachuelo” tagmanĝo de esperantistoj loĝantaj en Rio de Janeiro.

La hotela salono estas ornamita per floroj kaj esperantaj flagoj. Ĉirkaŭ Eforma tablo sidis 19 geesperantistoj.

Inter du pladoj S-ro Generalo Silveira Sobrinho legis sian raporton pri la antaŭa tagmanĝo, kiu estas varme aplaŭdita. Poste oni aklamis raportonto S-ron D-ron J. B. Mello e Souza, direktoron de l’ kabineto de la ministro de Interno kaj unu el la plej kleraj kaj fervoraj brazilaj esperantistoj.

S-ro A. Couto Fernandes, prezidanto de B. L. E., sciigis al siaj kunmanĝantoj ke la 3an de Aprilo li havis la grandan plezuron paroli per la senfadena telefono kun S-ro E. Houbart, direktoro de la grava pariza revuo “La Movado”.

Li tiam salutis la francan esperantistaron nome de la brazilaj esperantistoj kaj S-ro Houbart dankis kaj reciprokis la saluton. Ĉiuj varme aplaŭdis la parolinton.

S-ro D-ro Luiz Porto Carreiro Neto, ĝenerala sekretario de B. L. E., proponis ke oni sendu saluton al la hungaraj samideanoj pere de S-ro Berger Bertalan, kiu post restado en Rio de Janeiro dum kelkaj jaroj, tuj revenos al sia patrujo.

Li diris ke S-ro Bertalan kaptis la simpatian de siaj brazilaj samideanoj kaj en ties nomo lin adiaŭis. La propono estas varme aprobita kaj subskribita de ĉiuj ĉeestantoj.

Leviĝis S-ro Bertalan kaj parolante en portugala kaj esperanta lingvoj dankis la pruvon de amikeco de la brazilaj esperantistoj kaj diris ke li jam bone scias la signifon de la portugala vorto “saudade”, kiun la portugallingvanoj tradukis esperanten per la vorto “saŭdado” kun aprobo de D-ro Zamenhof.

La belga esperantisto S-ro Ernest Van Steen ankaŭ salutis kaj adiaŭis S-ron Bertalan, aldirante ke dank’ al Esperanto ili ligiĝis per forta amikeco.

(1) Olinda, la dua urbo en ŝtato Pernambuco, laŭ graveco, distas de la ĉefurbo Recife je ĉirkaŭ 6 km; hodiaŭ oni iras de unu urbo al la dua tute oportune per tramveturilo aŭ aŭtomobilo.

S-ro Couto Fernandes salutis S-inon Julieta Mello e Souza Miranda, iam fervora propagandistino, kiu delonge ne ĉeestas la esperantistan rondon kaj rememoras la servojn faritajn al Esperanto de la familio Mello e Souza.

La medicina studento S-ro Maltez Fernandes salutis la japanan esperantiston S-ron H. Jutaka Kikuĉi, kiu antaŭ kelkaj tagoj estas alveninta al Rio de Janeiro por studi ĉe la Fakultato de Medicino, kaj tiu ĉi dankis la saluton.

Krom la cititaj personoj, ĉeestis la tagmanĝon la jenaj: S-ino João B. Mello e Souza, f-ino Yrany Baggi de Araujo, D-ro Carlos Domingues, S-ro E. Felix Tribouillet, D-ro Venancio da Silva, S-ro Odillo Pinto, Ing. Arthur Napoleão da Silva, S-ro Raymundo Cantão, S-ro Guilherme Azambuja Neves kaj S-ro Eustorgio Wanderley.

Diversaj ĵurnaloj en Rio de Janeiro publikigis sciigojn pri la tagmanĝo kaj "O Globo" kaj "A Patria" fotografajon de la partoprenintoj.

BERGER BERTALAN

Je la 7a de Majo forveturis al Eŭropo nia kara hungara samideano S-ro Berger Bertalan.

Tiu ĉi simpatia esperantisto depost sia alveno al Brazilo, antaŭ kvin jaroj, ĉiam partoprenis le lokan esperantistan vivon.

Li faris tie ĉi multajn amikojn kaj, tial, la sciigo pri lia forveturo estas malĝoje akceptita.

Aliloke ni parolas pri la lasta esperantista tagmanĝo, dum kiu oni lin kore adiaŭis kaj transdonis al li salutitan leteron al liaj sampatrujanoj, kiuj tiel ĝentile akceptis D-ron Carlos Domingues okaze de ties vizito al Budapeŝto.

Al la forveturo ĉeestis la estraranoj de B. L. E. kaj diversaj amikoj, kiuj lin adiaŭis dezirante ke li faru bonan vojaĝon, trovi sana sian familian kaj baldaŭ reveni al Brazilo.

S-ro Bertalan telegrafis al B. L. E. el Victoria kaj Recife. Jen la teksto de la telegramo el Recife: "Hodiaŭ forlasante mian duan patrujon mi salutas miajn geamikojn."

KATOLIKA KONGRESO

Dum la tagoj 16 — 20 de Aŭgusto proksima okazos en Budapeŝto la XVa Internacia Katolika Esperanto Kongreso. La Hungarlanda Katolika Esperanto Societo ĝin partoprenos per ĉiuj fortoj kaj ĝin helpos ĉiu estraro eklezia kaj laika kaj ankaŭ la aranĝa ĉefkomitato de la Sankta Emeriko-jaro.

Je la 17a okazos la inaŭguro de la monumento de Sankta Emeriko.

Oni organizas karavanojn en diversaj landoj. La kongreskarto kostas 8 sv. fr.

Leteradreso de la Loka Organiza Komitato: Budapeŝto 62, Portafiók 203.

O SR. CARL LAEMMLE E O ESPERANTO



Snrs. J. Scherer e Carl Laemmle.

O *Heroldo de Esperanto*, em seu numero de 9 de Maio, publica um artigo do Sr. J. Scherer, no qual este narra uma entrevista que teve com o Sr. Carl Laemmle, celebre fabricante de films, o "Tio Carl", tambem cognominado "Napoleão da industria de films", do qual transcrevemos abaixo os topicos principaes:

— Snr. Laemmle, acredita na utilidade do Esperanto?

— Certamente! Já era essa a minha opinião ha quatro annos e hoje estou disso ainda mais convencido.

— Os films falados em varias linguas são muito dispendiosos?

— Sim, dispendiosissimos. Como os films falados em inglez não são apreciados na Europa, por causa da difficuldade dessa lingua, alguns films falados teem sido fabricados em espanhol, allemão e francez. Mas, por causa de seu alto custo, tenho duvidas se elles conseguirão successo financeiro.

— Snr. Laemmle, sabe que o Esperanto pôde ser aprendido em pouco tempo?

— Se sei? Certamente que o sei! Já estudei um pouco de Esperanto. Mostre-me um jornal redigido nesse idioma e verá que o comprehendo.

— Bem, Snr. Laemmle, eis o "Esperanto", organ official de U.E.A., e a nossa gazeta semanal de grande formato, o "Heroldo de Esperanto".

O Snr. Laemmle pegou na gazeta e leu immediatamente: "Renascença..." "Ao mundo veio um novo sentimento"... grandes progressos na Suecia... etc.

Na verdade o Snr. Laemmle comprehendeu bem e pronunciou perfeitamente as palavras. Foi

para o meu coração esperantista uma alegria fora do commum ver como esse celebre fabricante de films se enthusiasmava pelo lado idealista e pela simplicidade de nossa lingua.


— Oh! Estou certo, continuou o Sr. Laemmle, de que o Esperanto é a melhor lingua artificial e... — ahi elle demonstrou o lado idealista de seu coração com voz branda e brilho nos olhos — não tenho duvida de que elle será o instrumento mais efficaz para tornar possivel a paz mundial e os films falados em Esperanto virão auxiliar esse nobre fim.

— Sabe que já existem films em Esperanto?

— Sim, li com grande interesse que a Paramount fabricou um film em Esperanto e com o maior interesse estudarei os seus resultados, porque do exito desse film dependerá o mais. Carl Laemmle com essas palavras dava a perceber que certamente outras fabricas de films (além da sua) seguiriam o exemplo e fabricariam films em Esperanto.

Para mostrar a todo o mundo a sua sympathia pelo Esperanto elle ordenou aos photographos que o photographassem em companhia do Snr. J. Scherer, afim de que elle pudesse remetter cópias aos jornaes esperantistas e outros que publicassem sua entrevista."

NEKROLOGO



GENERALO SEBERT

La 25 an de Januaro lasta mortis en Parizo, 92 aĝa, la famkonata esperantisto Generalo Seberty. Lerninte en la Politeknika Ler-

nejo li eniris en 1860 en la maran artilerion, kiel sub-leŭtenanto. En la jaro 1890, jam generalo, li ekzigis kaj okupis postenojn en gravaj industriaj asocioj. Li ricevis la komandoran krucon de Honora Legio kaj diversajn fremdajn ordenojn.

En 1892 li estas elektita membro de Franca Scienca Akademio, kie li kun Prof. Naville prezentis en 1901 raporton por Esperanto, kiu elvokis la atenton de multaj eminentaj scienculoj.

En 1905 li fondis en Parizo la Centran Oficejon, kiu ekzistis ĝis la kontrakto de Helsinki. Pro liaj grandaj laboroj por Esperanto lia nomo meritas esti skribata per oraj literoj en la historio de la internacia lingvo.

Al lia familio niajn sincerajn kondolencojn.

— La 25an de Majo, 83 jara, mortis S-ro *Francisco Fernandes Junior*, patro de D-ro Alberto Couto Fernandes, prezidanto de B. L. E. Ĉar li tre ŝatis la anglan lingvon, li lernis Esperanton pere de angla gramatiko antaŭ 20 jaroj kaj diversfoje interparoladis en Esperanto kun sia filo.

— La 9an de Junio mortis S-ro *John Bloomfield*, patro de F-ino Esther Bloomfield,

unua sekretario de Brazila Klubo "Esperanto", kaj la 10an de la sama monato S-ro Kapitano *Pedro Malheiros*. Ambaŭ estis anoj de B. L. E.

Al iliaj familioj ni kore kondolencas.

— Komisiono konsistanta el tri estraranoj de B. L. E. akompanis la enterigiron de Lia Kardinala Moŝto Arcoverde, ĉefepiskopo en Rio de Janeiro, kiu diversfoje elmontris sian simpatian al Esperanto.

ESPERANTO ĈE LA ARGENTINA POŝTO

La Ĝenerala Direktoro de Poŝtoj kaj Telegrafoj, D-ro Antonio S. Amallo, organizis informservon por fremduloj ĉe la ĵus konstruita palaco por sidejo de poŝta kaj telegrafa direkto en Buenos Aires. Oni aranĝis por tio belegan ĉambregon en la dua etaĝo de la palaco. Ĉi tiu "Salono por Fremduloj" ("Hall de Extrangeros") estas bele ornamita per floroj, kreskaĵoj, artaj mebloj, k. t. p. Muraj tabeloj kun statistikaj grafikoj montras al vizitantoj la staton de la financoj, komerco, industrio kaj naturaj produktaĵoj de la lando. Komfortaj apogseĝoj ĉirkaŭas grandegajn tablojn, sur kiuj kuŝas je la dispo de l'publiko amaso da revuoj, ĵurnaloj, jarlibroj, gvidkartoj, k. t. p. redaktitaj diversnacilingve. Dank' al klopodoj de Argentina Esperanto-Asocio ankaŭ Esperanto-gazetaro troviĝas inter publikigaĵoj ĉiulingvaj, sed la Asocio ne ĉiam povos regule provizi esperantan materialon al tiu ĉi grava oficiala informejo. Tial oni petas al ĉiuj redaktejoj sendi regule ekzemplerojn de siaj eldonaĵoj rekte al nomita servo, sub la jena adreso: Direkto Ĝenerala de Poŝtoj kaj Telegrafoj (Hall de Extrangeros), Buenos Aires, Argentino. Ankaŭ por tiu ĉi servo la Ĝenerala Direktoro estas organizante interpretistan fakon por atenti la informpetojn de fremdula publiko. La interpretista fako estos kunmetita el la mem ofi-canta poŝtistaro, inter tiuj, kiuj scipovas alian lingvon krom la nacia. Speciala demandaro estas disdonita al la tuta oficistaro. Ankaŭ en tiu ĉi fako estas enmetita nia lingvo. La Direktoro akceptis kiel Esperanto-interpretiston sinjoron Fermin R. Varela, malnovan esperantiston, kiu deĵoras ĉe la telegrafa sekcio. Nune nur oni atendas la finan organizon de la fako. La interpretistoj kunportos koncernan brakrubandon kaj insignon.

ESPERANTO EN MEKSIKO

La esperantistoj en la meksika Respubliko festis dum aŭtuno 1929 la 25 jaran datrevenon de la enkonduko de Esperanto en ilian landon. Ni posedas ekzempleron de la broŝuoprelego de D-ro Ambrosio Vargas pri la Zamenhofa lingvo en 1904. Al tiu sindona pioniro de nia movado ni sendas koran gratulon kaj dankesprimon pro ĉio, kion li faris por nia afero. Al ĉiuj liaj kolegoj kaj sekvintoj ankaŭ nian amikan saluton kaj bondeziron!

Estas kuraĝigo, konstati ke la datrevena ceremonio kune kun parolado de D-ro Vargas okazis en la Civitana Centro Alaro Obregon kaj estas anoncita en la bele ilustrita oficiala programo eldonita de la Direktoro de Civitana Reforma kaj Kultura Agado, registara fako.

EKVADORO

La plurjara propagando de la ICK en Ĝenevo je distanco kaj la reserĉado pri antaŭmilitaj esperantistoj pli kaj pli montras fruktojn. En Quito nun rekomenciĝas movado per starigo de vesper-kursoj. Fervoraj propagandistoj en ĉi-tiu urbo estas S-roj J. E. A. Ortega y Herrero kaj Galo Marín.

ĈILO

Nun la propagando de Esperanto pli kaj pli disvastiĝas en Magallanes, la plej suda parto de la ĉilia teritorio. Sep studemaj junuloj solaj, sen instruanto, lernis nian lingvon, kaj korespondas kun eksterlando.

ESPERANTO EN ARGENTINA SCIENCA SOCIETO

Argentina Societo pri Mineralogio kaj Geologio akceptis Esperanton kiel oficialan lingvon por ĝia internacia korespondado kun similaj institucioj tutmondaj. Tiu, ĉi societo ĵus fondita por antaŭenpuŝi la minindustrion en Argentino kaj progresigi la geologi — kaj hidrologiajn studojn kaj esplorojn en tiu ĉi lando estas kunmetita pere de la plej gravaj enlandaj profesiuloj en la nomitaj sciencoj. Ĝia estraro konsistas el la jenaj sinjoroj: Prezidanto, Ing. Domingo Fernandez Beschtadt (eks-Ĝenerala Direktoro de Ŝtataj Fervojoj,

Universita docento, k. t. p.); 1.^a Vic-Prezidanto, D-ro Luciano R. Catalano (Geologies-tro ĉe Agrikultura Ministrejo); 2.^a Vic-Prezid. Ing. Guillermo Hileman (Boradfakestro ĉe la Naciaj Petrolputoj); Sekret., D-ro. Pablo Groeber (geologia univ. docento); Kasisto, D-ro Mario Torre (kemi-farmaciisto). Inter aliaj membroj estas kleruloj kiel D-ro Carlos Ameghino, Direktoro de Naturscienca Muzeo ĉe La Plata, frato de la fomkonata Florentino Ameghino, kies teorioj pri la homa origino estas altjuĝataj tutmonde, D-ro Lukas Kraglievitch, klera paleontologiisto, D-ro Roberto Beder, D-ro Anselmo Windhausen, ktp.

ESPERANTO EN INTERNACIA KONGRESO

Proponita de Argentina Delegito (oficiala), D-ro Luciano R. Catalano, Esperanto estas akceptita kiel internacia lingvo en la Kongreso de Amerikaj Universitatoj, okazinta ĉe Habana (Kubo) la 14 — 17an de Februaro de la nuna jaro.

PELO ESTRANGEIRO

— A Associação de Professores de Noerrkoping, Suecia, arranĝou un curso de Esperanto, ao qual compareceram cerca de 60 professores primarios. Esse curso foi feito em duas turmas, numa das salas da Escola Gustav Adolf, cedida pela directoria da Instrução, e levado a termo apenas em 20 lições, com resultado plenamente satisfactorio.

— O parlamento sueco unanimemente aprovou, sem discussão, uma subvenção de 2.900 coroas para cursos de Esperanto a serem dados aos professores de escolas primarias da Suecia. Já por varios annos o governo daquelle paiz tem feito o mesmo, auxiliando a inclusão da lingua internacional nos cursos das suas escolas.

— O Esperanto tambem progride entre os professores da Saxonia. A Associação Esperantista de Professores Saxões conta 400 membros. Durante o inverno europeu de 1929 abriram-se 14 cursos, com 180 alumnos, professores primarios; para esse fim, o Ministerio da Instrução deu novamente 500 marcos, e a Associação de Professores Saxões 400 marcos. Igualmente no Instituto Pedagogico de Estudos Superiores de Dresden, o Esperanto é materia facultativa.

— A Comissão Esperantista de Turismo, de Stockholm, arranĝou viagens baratas áquella cidade, e, para pleno effeito da sua organização, pediu ás instituições officiaes e varias outras importantes a abertura de cursos de Esperanto aos seus funcionarios. Foram, assim, organizados 6 cursos

para o pessoal dos bondes, por immediata decisão da directoria da companhia ferro-carril de Stockholm. Tambem a directoria dos telegraphos abriu cursos da lingua auxiliar. Além destes, outros cursos estão em via de ser dados a todos os funcionarios do Estado, afim de facilitar aos turistas a sua estadia na Suecia.

— Na esphera da radio-telephonia, o Esperanto obteve grande successo no anno transacto; pelo menos uma palestra nesse idioma foi irradiada por dia de qualquer estação européa. O programma esperantista de radio, compilado pela Comissão de Estatística do Radio, é publicado regularmente todas as semanas e transcripto nas mais importantes gazetas esperantistas, assim como por varias revistas e jornaes de radio de diversos paizes, entre os quaes: "Der Deutsche Rundfunk", da Allemanha, "World Radio", da Inglaterra, e outras da Tcheco-Slovaquia, Dinamarca, Hollanda, Italia, Polonia, Suecia, etc. Houve semanas de serem irradiados por mais de 40 estações assumptos referentes ao Esperanto; pela estatística da supra alludida comissão, foram feitas em 1929 mais de 1.500 irradiações em ou sobre o idioma internacional, em 62 estações do continente europeu. Mas, não só neste como em outros, o Esperanto recebeu, como sempre, a sympathia das estações radio-telephonicas.

— Na Estação de Radio de Lyon, chamada Lyon-la-Doua, foi feita no principio deste anno uma experiencia interessante. O Sr. Borel, que faz uma chronica regular sobre o Esperanto, servindo-se daquella estação, todos os sabbados, fez vir ante o microphone cinco esperantistas de nacionalidades diversas para ler tres estrophes do poema de Zamenhof "Al la Fratoj", a saber: um russo, um alemão, um hungaro, um francez (aliás, franceza) e um polonez. O fim do concurso era responder a que nacionalidades pertenciam os varios declamadores. Chegaram 144 respostas, verificando-se que os mais habeis concorrentes acharam apenas duas nacionalidades entre as cinco apresentadas, donde se vê a homogeneidade de pronuncia do idioma auxiliar.

— Na conferencia annual da "National Union of Women Teachers", em Canterbury, realizada em janeiro proximo passado, foi unanimemente aceita uma moção, cuja traducção damos a seguir:

"Na convicção de que o incremento da comprehensão internacional depende de mais intimo e immediato intercambio de idéas entre os povos do mundo, esta Conferencia é de opinião que se deveria adoptar e ensinar uma lingua auxiliar em todas as escolas."

— Soó o titulo "A Lingua da Liga das Nações" o grande reporter Ludovic Nadeau escreveu no "Est Republicain" um interessante artigo, do qual extrahimos o trecho seguinte:

"Minha propria convicção depois de um quarto de seculo passado em todas as partes do mundo, na atmosphera dos grandes acontecimentos, é que o obstaculo linguistico é a causa principal de todas as desintelligencias, de todas as desgraças que desabam sobre a humanidade. E' antes de tudo porque elles não se comprehendem, não se conhecem, não podem interrogar, responder, nem se explicar, que os povos têm suspeitas mutuas e se odeiam.

Queira cada um reflectir seria e profundamente, antes de declarar, por principio, que a tentativa

de generalisar o estudo de uma lingua internacional, em todas as escolas da Europa, seria irrealizavel. Estamos bem seguros disso? Em ultima analyse, persuadamo-nos de que a empresa dependeria unicamente dos diversos governos europeus e que lhes bastaria, para isso, quererem.

Aquelle que passou uma parte de sua vida no estrangeiro, constantemente ás voltas com os idiomas os mais variados, póde bem avaliar o immenso progresso que constituiria essa innovação. E, quanto a mim, não hesito em declarar que todo progresso no caminho da pacificação internacional sera subordinado á realisação desta resolução contra as fatalidades naturaes."

— O Ministro da Instrucção Publica da Republica da Grecia expediu em 28 de Outubro ultimo aos Inspectores Geraes das Escolas Publicas a seguinte circular, que tomou o numero 55.527:

"Considerando a importancia que diariamente adquire no mundo civilisado a lingua internacional Esperanto, por documentos consecutivos temos recommendado ao Inspector Geral das Associações Publicas de Athenas que elle permittisse ao presidente da "Helena Esperanto-Asocio", Sr. Dr. A. Stamatiadis, instruir o Esperanto aos alumnos do Gymnasio e Instituto de Professores de Athenas e Pireo em horas em que elles estivessem livres.

Ultimamente o Dr. Stamatiadis trouxe ao nosso conhecimento que tambem em outras cidades da Grecia já existem pessoas, que podem assumir a direcção de cursos de Esperanto e pede que vos recommendemos que lhes deis o vosso apoio para que essa lingua possa tambem ser ministrada nesse districto.

Por consequencia, pedimos que recommendeis aos Directores das Escolas de Instrucção Complementar do vosso Districto, que elles permittam aos alumnos, que desejarem frequentar o curso de Esperanto, serem instruidos por pessoas que forem designadas pelo "Helena Esperanto-Instituto". Assignado: K. Gondigas, Ministro."

— *Les Nouvelles Médicales de Paris* publicaram uma carta do Dr. Barbedor, da qual extrahimos as seguintes linhas:

"Estudei o latim, como todo alumno do curso secundario, durante sete annos. Isso com professores, correcção de deveres... e approvações.

No fim da guerra, cahiu-me nas mãos um manual de Esperanto, que, por distracção, folhee e estudei sósinho. Desde então, decifro um pouco de

Esperanto de tempos em tempos, talvez uma hora por semana, sem methodo, ao acaso dos jornaes.

Actualmente, leio facilmente na *Internacia Medicina Revuo* trabalhos originaes de russos, de tcheco-slovacos, de japonezes, e tenho me correspondido com húngaros e japonezes, muito admirado de uma tão pratica comprehensão.

P. C. N.

O ESCOTISMO E O ESPERANTO

Do relatório da Commissão Geral do Conselho Municipal de Lyon, dando parecer favoravel á proposta relativa a uma subvenção á secção lyoneza dos "Escoteiros de França", destacamos as seguintes linhas:

"Entre os argumentos apresentados em apoio do pedido de subvenção eu saliento que a Federação dos Escoteiros de França faz parte da Federação Internacional de Escotismo, que forma no mundo uma vasta fraternidade; que o Congresso de Paris de 1922 reuniu 30 nações; que todos os escoteiros do mundo, cerca de dois milhões, vestem o mesmo uniforme, tem a mesma lei, os mesmos principios e aprendem a se conhecerem e a se amarem.

"Pergunto, então, a mim mesmo como esses rapazes, pertencendo a 30 nações diferentes, podem se comprehender, pois que, com certeza, não conhecem todos uma mesma lingua.

"Meus votos são para que o boy-scotismo faça do Esperanto sua lingua auxiliar unica.

"Corresponderá assim melhor e mais rapidamente ao desejo expresso pela Sociedade das Nações de ver se multiplicarem os contactos entre as mocidades nacionaes, para que aprendam a se amarem e a se estimarem".

O relatório, que era assignado pelo Sr. Reynier, foi approvado.

("La Movado" — Paris — Março de 1930).

BRAZILA KRONIKO

MARANHÃO — *S. Luiz*. — S-ro Fernando Perdigão, filo de la mortinta fervora propagandisto S-ro Domingos Perdigão, petis telegrafe al la prezidanto de B. L. E. kelkajn ekzemplerojn de "Ekzercaro" kaj vortareto por siaj lernantoj. Ni esperas ke S-ro Fernando Perdigão tute ne permesos ke malaperu la malnova Grupo Esperantista Couto Fernandes fondita de lia patro.

PARAHYBA DO NORTE — *Santa Rita*. —

Varbite de nia samideano S-ro Manoel Tavares Filho aliĝis al B. L. E. S-ro Claudio Lemos.

PERNAMBUCO — *Olinda*. — S-ro Sebastião de Albuquerque sciigis nin ke, kvankam li ricevis telegramon de la prezidanto de B. L. E. pri la forveturo al Eŭropo de nia hungara samideano S-ro Berger Bertalan, li ne havis la plezuron lin akcepti kaj persone konatigi kun li pro malsano, kiu lin surlitigis.

BAHIA — *Santa Iñez*. — El nia samideano D-ro Arsenio Moreira da Silva ni ricevis leteron, per kiu li nin sciigas ke li vojaĝis al *S. Salvador* speciale por konatiĝi kun S-ro Berger Bertalan, kun kiu li de ok jaroj korespondadis. Per kortuŝantaj vortoj li elmontris la sentitan ĝojon, kiam li povis lin vidi kaj premi liajn manojn.

ESPIRITO SANTO — *Victoria*. — La loka skolta gazeto "Vida Escoteira", kies redakcio funkcias ĉe *Grupo Escolar Gomes Cardim*, sciigis sian legantaron pri la vizito de "Skolta Heroldo", oficiala organo de Skolta Esperantista Ligo".

S. PAULO — *S. Paulo*. — Je la komenco de Aprilo la malnova grupo "Populara Asocio Esperantista" estas reorganizita kaj rekomenzis regulajn kunvenojn ĉiumarde, je la 19.45, en la granda salono de la *Teozofia Societo Veritas*, strato Quirino de Andrade, 21, unua etaĝo. Tiu societo afable disponigis sian salanon ne nur por la semajnaj kunvenoj, sed ankaŭ por la senpaga kurso de Esperanto, kiu funkcias ĉiujfaŭde sub la gvidado de S-ro Hary Petersen.

Je la 15a de Aprilo okazis ĝenerala kunveno de la grupo, dum kiu oni decidis ŝanĝi ĝian nomon kaj elektis la jenan estraron: Prezidantoj — S-roj Virgilio Guayanaz de Souza kaj Hary Petersen; sekretario kaj kasisto — S-ro Frederiko Mayerhauser.

La nuna nomo de la grupo, kiu jam aliĝis al B. L. E., estas: *San-Paŭla Grupo Esperantista*.

Ĝi ankaŭ decidis aboni al "Heroldo de Esperanto" por esti konstante kaj senprokraste informata pri la tutmonda Esperantomovado kaj aliĝi al U. E. A., por ke ĝi povu ricevi ĝian oficialan organon kaj jarlibron. Al tiu grupo B. L. E. sendis diversajn propagandilojn.

PARANÁ — *Coritiba*. — Aliĝis al B. L. E. F-ino Luiza Deeke.

S. CATHARINA — *Florianopolis*. — La 1929a raporto de "Gymnasio Catharinense" publikigas detalajn sciigojn pri la funkciado de "Gimnasia Esp. — Rondeto" kaj pri la vizito, kiun faris al tiu instituto D-ro Grabowsky, pola ministro ĉe la brazila registaro, kaj D-ro Odo Bujwid, profesoro de la Universitato de Krakovo kaj redaktoro de "Pola Esperantisto", okaze de ilia vojaĝo tra Brazilo por studi la vivkondiĉojn de la tieaj pollingvanoj.

— La grupo devis kunveni dum la monato

Majo por decidi pri sia aliĝo al B. L. E., sed pri tiu kunveno ni ankoraŭ ne ricevis ian informon.

— Estas elektita prezidanto de la Organiza Komitato de la Naŭa Brazila Kongreso de Geografio, okazonta en Florianopolis dum la monato Oktobro nia klera samideano D-ro José A. Boiteux.

— Alvenis tie S-ro Inĝ. Ernest Van Steen, belga samideano, kiu restos en tiu ŝtato du aŭ tri monatojn. Li intencas helpi la tiean propagandon de Esperanto.

RIO GRANDE DO SUL — *Pelotas*. — F-ino Maria Cesar, anino de "Virina Klubo", veturante al tiu ŝtato vizitis nian fervoran samideaninon F-ino Antoninha Barum.

MINAS GERAES — *Bello Horizonte*. — Vojaĝinte al tiu ĉefurbo D-ro E. Backheuser ricevis la viziton de S-ro João Guimarães Rosa, kun kiu li multe interparoladis. La sekvintan tagon li ĉeestis specialan kanvenon de Montara Esperanto - Klubo je sia honoro, kiu okazis la 11 an de Majo sub la prezido de F-ino Maria José de Azeredo Penna.

Salutis D-ron Backheuser S-ro João Vianna, sekretario de MEK. Tiu dankante la saluton paroladis dum unu horo pri Esperanto kaj ĝiaj lastaj progresoj.

Li sciigis la ĉeestantaron ke la Direktoro de la Publika Instruado en Rio de Janeiro, kreinte la Servon de Internacia Lerneja Interŝanĝado, akceptis la helpon de B. L. E. por traduko de la korespondaĵoj ricevitaj kaj sendotaj de la gelernantoj de la publikaj lernejoj. Li finis sian paroladon instigante la ĉeestantajn instruistinojn de la Perfektiĝa Lernejo helpi la propagandon de Ŝtato Minas Geraes utiligante la helpon de MEK ĝis ili bone scipovos la internacian lingvon. Longa aplaŭdado kronis la lastajn vortojn de D-ro Backheuser. Krom la geanoj de MEK, ĉeestis la kunvenon prof. S-ro Tito Novaes, instruistinoj kaj lernantinoj de la Perfektiĝa Lernejo, lernantoj de Collegio Arnaldo kaj instruistinoj de Lernejo Rio Branco.

— S-ro Geraldo Padua sciigis nin ke li intencas fondi klubeton por kunlabori kun MEK en la propagando de Esperanto.

Teixeiras. — Dum sia vojaĝo al tiu Ŝtato S-ro Ismael Gomes Braga restis unu seĝmanon ĉe sia patrino, kie li profitis la okazon por instrui Esperanton al siaj gefratoj Conceição, Vinina kaj Octavio po du lecionoj ĉiutage. Li uzis la naturan metodon kaj vere

BIBLIOGRAPHIO

Ni ricevis kaj tre dankas:

Boletim de Educação Publica. — Trimonata publikigaĵo de la Ĝenerala Direktejo de Publika Instruado en Rio de Janeiro — Brazilo. Ĝi enhavas tradukon el artikolo aperinta en "Internacia Pedagogia Revuo".

Ruĝa Aŭroro. — Verkita de M. Ljubin. Eldono de "Balkana Laboristo", n. 1. Prezo: 0.50 gm. *Ulica Sar planina N. 56. Sofia. Bulgarujo.*

Esperanto — Literaturo. — "Originaloj kaj tradukoj". Katalogo de Ferdinand Hirt & Sohn. Esperanto — Fako. *Salomonstrasse 15. Leipzig C. 1. Germanujo.* Petu ĝin.

L. L. Zamenhof. Originala Verkaro. — Antaŭparoloj — Gazetartikoloj — Traktaĵoj — Paroladoj — Leteroj — Poemoj. Kolektitaj kaj ordigitaj de *D-ro Joh. Dietterle* — Kun 6 faksimilaĵoj kaj portreto de L. L. Zamenhof. Ĝi estas dediĉita al la energia kaj kuraĝa antaŭbatalantino por la ideo de mondhelplingvo *Sinjorino Alice V. Morris* en New York, honora sekretariino de I A L A. La celo de ĉi tiu libro, kolekti ĉion, kion d-ro L. L. Zamenhof originale verkis en Esperanto. Tial ne estas necese aldoni ke ĉiu vera esperantisto devas ĝin posedi en sia biblioteko. Mendu ĝin ĉe "*Fer-*

dinand Hirt & Sohn en Leipzig. Esperanto — Fako. Prezo: RM 15.

La Laborĉarto. — Publikigita de la Itala Registaro. (El la *Oficiala Gazeto* de 30 Aprilo 1927). Tradukis A. L. Reni. Ĝin dissendis al ĉiuj delegitoj de U. E. A. kaj al la prezidantoj de lokaj societoj "Verona Esperanto Asocio". (*Via Goffredo Manseli 2 Verona. Italujo*). Pliaj ekzempleroj estos riceveblaj per antaŭpago de unu itala liro.

Leipziga Foiro. — Ilustrita propaganda folio pri la jenaj foiroj: Leipziga aŭtuna foiro 1929: komenco 25 de Aŭgusto. Leipziga printempa foiro 1930: komenco 2 de Marto. Petu ĝin al *Leipziger Messamt. Körperschaft des öffentlichen Rechts. Esperanto — fako. Leipzig C. 1. Postschlielfach 232. Germanujo.*

Oficiala Bulteno de la Esperantista Akademio. — Kajero II. Februaro 1930. Raporto de la Direktoro de la Sekcio: "Komuna Vortaro". Kvara aldono al U. V. *Paris. Esperantista Centra Librejo. 51, Rue de Clichy.* Prezo: 1 sv. fr.

La Konscienco Riproĉas. — *August Strindberg.* — El la sveda lingvo esperantigis G. H. Backman. Kun antaŭparolo de *Marie Hankel.* Eldonejo: *G. H. Backman, Ramlösa Brunn, Svedujo.*

Aŭstrio. — Belega ilustrita gvidlibro pri

surpriziĝis pro la mirinda rezultato de siaj lecionoj.

RIO DE JANEIRO. — Aliloke ni publikigas la ĉefajn okazintaĵojn en la ĉefurbo de Brazilo. La tieaj ĵurnaloj publikigis dum la unua duonjaro multegajn notojn kaj artikolojn pri kaj por Esperanto. Ni citas ĉi-sube nur la ĉefajn:

"*Jornal do Commercio*", "*O Globo*" kaj "*Correio da Manhã*" — Artikolo pri la apogo de la Registaroj al Esperanto.

"*Jornal do Commercio*" kaj "*O Globo*" — Longa artikolo pri la Servo de Lerneja Interŝanĝado. — Cirkulero de la Ministro de Instruado, el Grekujo, pri la instruado de Esperanto. — Esperanto en Argentino. — Detala sciigo pri la bela parolado de D-ro E. Backheuser pri la Servo de Lerneja Interŝanĝado.

"*Jornal do Commercio*", "*Jornal do Brasil*", "*Correio da Manhã*" kaj aliaj. —

Telegramo el Parizo pri la interparolado per la senfadena telefono inter S-ro A. Couto Fernandes, en Rio de Janeiro, kaj S-ro E. Houbart, en Parizo.

"*O Paiz*" — Letero de la Komerca Asocio dankanta al D-ro Carlos Domingues, kiu ĝin reprezentis ĉe la 21-a Universala Kongreso de Esperanto.

"*Jornal do Brasil*". — Diversaj notoj pri Esperanto kaj Skoltismo. — Interesa artikolo de D-ro Luiz Porto Carreiro Neto pri "Lerneja Interŝanĝado."

"*O Globo*" — Interesa intervjuo kun D-ro Carlos Domingues pri "La teknika komerca instruado ĉe la grandaj Eŭropaj centroj", kun lia portreto. — Artikolo pri Esperanto kaj Radio.

"*O Globo*" kaj "*A Patria*". — Detala sciigo pri la lasta esperantista tagmanĝo kaj fotografaĵo de la partoprenintoj.

Aŭstrujo eldonita de Ministerio por Komercio kaj Trafiko. "Internacia Esperanto—Muzeo", Wien I., Augustinstrasse 7, volonte sendos al ĉiu unuopa persono tri ĝis kvar diversajn gvidfoliojn kontraŭ alsendo de internacia respondkuponono.

En Okcidento nenio nova, de Erick Maria Remarque. El germana lingvo tradukita de kvar. Kun portreto de la aŭtoro, kiu prezentis sian libron per la jenaj vortoj: "Tiu ĉi libro estas nek akuzo nek konfeso. Ĝi estu nur provo raporti pri generacio, kiu estas detruita de la Milito — eĉ se ĝi eskapis de ĝiaj grenadoj". Eldono de *Heroldo de Esperanto*. Köln. Prezo: Broŝurita RM 7.

Esperanto kaj kulturo. — Individuo, popolo, homaro, de D-ro Robert Trögel, Dresden. Tradukis J. Schröder, Marbach B. Rosswein. Eldonis Heroldo de Esperanto, Köln. Prezo: RM 0.80.

Du majstro noveloj: La Blankĉevala Rajdanto kaj Violo trikolora, de Theodor Storm. Tradukitaj el la germana lingvo de Heino Heitmüller. Eldonis Heroldo de Esperanto. Köln. Prezo: Broŝurita RM 2.40, bindita RM 4.

Al Toronto. — Novelo originala en Esperanto, de Stellan Engholm. Eldonis Heroldo de Esperanto, Köln. Prezo: RM 1.50.

Bengalaj Fabeloj de Lakshmiŝvar Sinha. Ĝi estas lia dua originala verko en Esperanto. Lia unua verko estis drameto el la hinda historio: Sivaĝi. Eldoninto: "Eldona Societo Esperanto", Stockholm 1. Svedujo. Prezo: 1 Sveda krono.

Norda — Amerika Esperanto Almanako por la jaro 1930. Redaktita de J. J. Sussmuth

kaj eldonita de la Esperanto Asocio de Nord-Ameriko. *Fort Lee, N. J., U. S. A.* N.º 1 de E. A. N. A. Libraro.

Mallongaj Prozaĵoj de diversaj aŭtoroj. Skribitaj en Esperanta Stenografio. Eldonejo de Esperanta Stenografio: 9. *Boul. Voltaire. Issy — les — Moulinaux. Seine. Francujo*. Prezo: 1.50 fr. franko.

Lyon-a Internacia Foiro. 3 — 16. Marto 1930. Ilustrita esperantlingva propagandilo. Ĝi estas la sepa, kiun eldonis en Esperanto S-ro Richard Levin, direktoro de la Eksterlanda Propagando kaj Komerca Delegito de U. E. A. Krom tio la Foira Komitato presigis afiŝojn, sorbpaperojn, poŝtkartojn, flugfoliojn k. t. p. en la sama lingvo.

Iniciação Linguística. — Mysterios, leis e curiosidades da linguagem humana. Francisco Valdomiro Lorenz, el S. Feliciano. Rio Grande do Sul. Brazilo. Editado pela Empresa Typographica Editora "O Pensamento". Rua Rodrigo Silva, n. 40. S. Paulo. Brazilo.

B E S Adresaro de esperantistoj el ĉiuj landoj 1929/30. Sa eldono. Eldonita de BES Bohema Esperanto — Servo. *Potš tejn. Ĉeĥoslovakujo*. Prezo: 1 Fsv.

Prozo el Danaj — Norvegaj Aŭtoroj. — Tradukita de H. Th. Thomsen, prezidanto de "Klubo Esperantista", Kristiania. Esperanto — Forlaget. Norvegujo.

Bad Warmbrunn. — Ilustrita gvidfolio pri tiu tre konata kuraĉloko. Bela situanta en Hirschberg' a valo en Germanlando (Silezio), je la bazo de l' giganta "Riesen" — montaro, vastiĝas la loko enmeze de belaj herbejoj kaj fekundaj kampoj. Presita de Heroldo de Esperanto.

Livros em e sobre o Esperanto

GRAMMATICAS

DICIONARIOS

LITERATURA DE VARIOS PAIZES
SCIENCIA, ETC., ETC.

A' venda na séde do Brazila Klubo Esperanto.
Praça 15 de Novembro 101, 2.º

— — RIO DE JANEIRO — —

Remettem-se encomendas pelo correio (10% para o porte e registro)

O pagamento deve ser feito adeantadamente, em vale postal ou carta registrada com valor declarado, dirigido ao presidente do Club — Dr. Carlos Domingues,

As principaes conquistas mais recentes do idioma auxiliar internacional

ESPERANTO

Dados colligidos pelo Engenheiro Luiz Porto Carreiro Neto, secretario geral da B. L. E. e vice-presidente do Brazila Klubo "Esperanto" —

Folheto de propaganda editado pela "Brazila Ligo Esperantista"

DISTRIBUIÇÃO GRATUITA

ALIGU AL via loka grupe, al Brazila Ligo Esperantista kaj al Universala Esperanto-Asocio (U. E. A.)

ALIĜU SENPROKRASTE

al 9-a eldono de

BES—ADRESARO

de esperantistoj el ĉiuj landoj

kiu celas kolekti adresojn de ĈIUJ esperantistoj.
— Simpla aliĝo 0.50 Fsv. kun adresaro 1. — Fsv, kun portreto kaj adresaro 1.50 Fsv — Anonca pago 25 Fsv. — Postulu senpage detalan prospekton de l' eldonanto:

BES (Boh. E. — Servo), POTSTEIN,
Ĉisl. Eŭropo.

KIU NE VOLAS

malprogresiĝi je la

NOVA TENDENCO

de la tuta mondo

tiu tuj skribu por ekhavi senpagajn specimenojn de la
Esperanta monata gazeto

“ O O M O T O ”

al

OOMOTO PROPAGANDA OFICEJO

Kameoka, Kioto-fu, Japanujo

BONVOLU ATENTE LEGI!

GRAVA SCIIGO!

Estimata Samidean(in)o!

Ni supozas, ke vi per la diversaj notoj en la Esperanto-gazetoj jam estas informita pri

niaj sukcesplenaj laboroj, celantaj enkonduki Esperanton en komerco kaj industrio per la praktikado mem. Denove varbinte firmon por nia afero, ni nun kore petas vin helpi, por ke la firmo vidu, ke reklamo per Esperanto estas sukcesplena. Bonvolu montri aŭ sendi la prospekton al persono, kiu via opinio interesiĝas pri ĝi, kolektu mendojn kaj sendu ilin al ni. Ni volonte estas pretaj, kompensi vian laboron en okazo de sukceso.

Fine ni petas, komuniki al ni adreson de Esperanto-komercistoj, por ke ni povu sendi al ili senkoste nian bultenon „La Komerko“. Atentigu okaze vian komercistaron pri nia organizaĵo, diru al ili, ke ĉiu povas aĉeti per nia helpo rekte de la fabrikistoj je originalaj prezoj. Por nia helpo ni kaj niaj agentoj (en 10 landoj) postulos nur malaltan makle-rajon por kovri la elspezojn. *Komerco tra la mondo per unu lingvo*, fakto, efektivigota de nia unio! Ni anticipe dankas por via kunhelpo kaj salutas samideane.

KOMERCISTA ESPERANTO-UNIO

Centro Dresden — Dresden/Radebeul

Germanujo

En Parizo, modeleganta kvartalo althurĝa sinjorino deziras luigi al gefremduloj (du aŭ tri) ĉambrojn moderne oportunajn kun banejeto, manĝoj ĉe la dommastrina tablo en Pariza Bonsocieto. Interesaj kondiĉoj kaj prezoj.

Por pli detaloj informoj skribi al S-ro Sédillot Delegito. 5 Rue Monceau. Tours. Franclando.

INTERESA NOVAĴO PRI LIĤTENSTEJNO

La registaro de l'Princlando Liĥtenstejno decidis aperigi serion da poŝtkartoj oficialaj kun bildoj de tiu ĉi pentrinda lando kaj klariga teksto. Kiel novaĵon oni povas rimarki, ke la teksto estos en germana lingvo kaj en Esperanto; tio lasta okazas por altiri la intereson de turistoj en la tuta mondo al la lando. Ĝia situacio inter Svislando kaj Aŭstrio, apud tre frekventata vojo de internacia komuniko, faciligas la viziton.